# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 11/04/2024 sescentokdekdua eldono (unua eldono 26/09/2011)**



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facila elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**ELEGANTAJ BICIKLOJ** 5A DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 6a de aprilo estis la unua sabato. Venis Chris kaj Roger.

02 9976 6320 *Roger S*

## Altiĝo de la prezo de ĉiutagaj varoj.

La raporto de Franciska Toubale pri la kreskantaj prezoj en la butikoj memorigas min pri la jena historio:

Maljuna avineto kritikas siajn samaĝulojn: "Miaj amikinoj daŭre plendas, ke la forto de la junaĝo malaperis. Mi ne komprenas, pri kio ili grumblas. Dum mia junaĝo mi facile povis hejmenporti aĉetaĵojn en la valoro de 50,- kronoj. Tion mi daŭre povas."


😉

Amike, *Peter Weide*



# La komentoj de Franciska pri *Altiĝo de la prezo de ĉiutagaj varoj* pensigas al mi pri la kvitancoj de Coles.

Ankaŭ mi ne plu estas juna kaj mi ŝatas havi paperajn kvitancojn, sed mi abomenas la kvitancojn de Coles. Ili ja listigas la varojn kiujn ni aĉetis, tio en mia hieraŭa aĉetado plenigas proksimume 8cm de la kvitanco, do kiom longa ĝi estas entute? Eble ĝi estu 10 cm longa. Ĝi fakte estas 48cm longa. Kia malŝparo de papero! Ĝi havas reklamojn kiujn mi kaj supozeble preskaŭ ĉiuj aliaj tute ne legas kaj krome tio kio incitas min estas, ke mi ne povas facile vidi kiom entute mi elspezis. En tre grandaj literoj estas skribite, ke mi ŝparis $16.45 kaj nur en malgrandaj literoj estas la sumo kiun mi elspezis. Mi ne vere ŝparis $16.45. Se mi aĉetintus malpli da varoj, tiam mi ŝparus monon. Krome ili altigas prezojn tiel ke dum mallonga tempo ili povas malaltigi kelkajn. Ili ne skribas sur la kvitanco kiom ili altigis la prezojn por povi malaltigi kelkajn kaj ankoraŭ fari profiton. Mi ja skribis al Coles por plendi pri iliaj kvitancoj, sed ne mirigos vin, supozeble, ke ili daŭrigas kun la samaj kvitancoj kaj rifuzas montri en grandaj literoj la sumon kiun ni elspezis kaj doni al ni malpli longajn kvitancojn.




*Nicole Else*



# Nia nova reklamilo kaj instrukciilo: "Esperanto Essentials,

La Aŭstralia Esperanto Asocio estas ekcitita prezenti sian novan reklamilon kaj instrukciilon: "*Esperanto Essentials,"* relaborita versio de la malnova sed estiminda "*Esperanto in Your Pocket*". La broŝuro estas malgranda, multkolora, kaj ampleksa gvidilo, kiu subtenos nian komunan mision disvastigi Esperanton tra Aŭstralio.

"*Esperanto Essentials*" klarigas Esperanton kaj ĝian utilecon, kaj instruas per mallongaj gramatikaj klarigoj, ekzercoj (kun respondoj), kaj du vortaretoj (Esperanto al la angla kaj inverse). Ĝi estas la perfekta ilo por ke iu ajn gustumu la brilecon de nia kara lingvo, kaj ankaŭ donas detalojn pri kie ili povas plu studi.

Ni ofertas ĉi tiujn 24-paĝajn broŝurojn al aliaj kluboj aŭ individuoj ĉirkaŭ Aŭstralio je nia kosto (po $1) plus sendokosto. Ĉu uzotaj por disdoni al la publiko ĉe eventoj, aŭ kiel bonvenigaj donacoj al novaj lernantoj ĉe via klubo, ĉi tiuj broŝuroj estos bonega maniero por vi reklami Esperanton en via komunumo.


Por mendi, bonvolu sendi retmesaĝon al ambaŭ Heather (erikino.48@gmail.com) kaj Jo (navear@gmail.com) kun la kvanto kiun vi ŝatus, kaj via adreso. ( ne necesas skribi du mesaĝojn , metu ambaŭ nomojn kaj adresojn kiel ricevontojn )



Ni esperas ke vi uzos ĉi tiun ŝancon por helpi disvastigi ĉi tiujn broŝurojn, por kreskigi Esperantujon en Aŭstralio kaj akvumi la semojn de pli konektita kaj komprena mondo.

**Joanne Johns**



# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 4-a de aprilo 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Terry Manley, Bradley McDonald (iomete)

## (1) Somerkursaro 2025

La Adelajdanoj komencis serĉi "serioze" kaj Trevor, Katja, Helen, Sandor helpas

Ĝis nun ni kontaktis proks 15 lokojn

## (2) Esperanto Domo en Melburno?

Ni daŭrigis la diskuton .....Joanne skribis detalan proponon …

Venontan mardon (9/4) okazos Zoom kunveno inter Joanne kaj Heather kaj membroj de la NSK Federacio por diskuti multajn detalojn …

## (3)Tri arkivaj labortagoj

Tri labortagoj en Sidnejo? Ni decidis: Ni laboros en Esperanto Domo por ordigi nian arkivon.

**Mer 24-a - ven 26-a de aprilo 2024** .....

**Merkredon (24/4) vespere ni iros al la artgalerio.**

Jonathan trovis skanilon en Esperanto Domo, kiun ni uzis. Kontaktu nin se vi volas helpi.

## (4) Esperanto Essential

Joanne presis 1,000. Kontaktu ŝin

## Venonta estrarkunveno

Ĵaŭdon, la 18-an de aprilo 2024 je la 17:00 (16:30 en SA) *Sandor Horvath*

US retreats from "Free Trade" – The Greanville Post (elektu Esperanton)

# Usono retiriĝas de "Libera Komerco"

### (sube mallonga eltiraĵo de la artikolo)

La malvenko de Ukrainujo sur la batalkampo montris, ke liberalismo - kun sia tuta imperiisma minaco kaj ĉiuj siaj impostaj enspezoj faŝisme dediĉitaj al ilia militistaro - ne povas batali kontraŭ la pli efika socialisma inspirita (sur la milit-ekonomia planadnivelo) Rusio.
La venko de Ĉinujo sur la ekonomia kampo ekde 2008 montris, ke liberalismo ankaŭ tie ne povas batali kontraŭ la pli efika socialisma inspirita modelo.

RAMIN MAZAHERI

# 3ZZZ

Heather preparis kaj prezentis la elsendon de la 8a de aprilo.

En ĝi estas pli da informoj pri la kongresurbo Aruŝo kaj Tanzanio, priskribo de bela loko en Italujo, la groto de Pertosa , eron pri la historio de kakao kaj studon pri la efiko de muziko al homa psiko

*Franciska Toubale*

